

Dua babilado kun niaj aŭskultantoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-818/282, 1979 junio 14 kaj 16

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-41/SRI-1979-41-A-3-282-818-1979-06-14-16-Claude-kaj-Andree-Gacond-Dua-babilado-kun-niaj-auskultantoj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La pasintan semajnon ni komencis saluti la aŭskultantojn, kiuj skribis, laŭ la alfabeto ordo de iliaj familiaj nomoj. Ni hodiaŭ daŭrigas tiun ĉi babiladon kun niaj aŭskultantoj.

S-ino Jane Claitte en Denicé, Francio, dankas, ĉar al la antaŭa letero ni rapide respondis. Ni bedaŭrinde konstatas, ke ĉiĵoj ni estis malpli akurataj. Ĉiuj skribintoj, kiuj ne tuj ricevis respondon de ni, bonvolu havi komprenemon. Kelkfoje la laboro ĉiaspeca tro abundas, kio devigas nin al malakurateco. Tio estas ofta malsano en esperantujo.

A.- S-ro P. Cugny en Dijon, Francio, dum trimonata restado sur la "Lazura Marbordo" profitis la pli grandan liberan tempon por nin regule aŭskulti. Li sendis interesan raporton. Tiuj ĉi aŭdraportoj, kiuj mencias la ŝatatajn temojn, nin helpas en nia radio-laboro.

Cl.- Ni esperas, ke s-ro Jacques De Bloudts en Bruxelles, Belgio, ricevis la petitan radio-programon. Same estu por ĉiuj petintoj. Se tio ne estas, vi bonvolu refoje skribi, por ke via adreso estu registrita.

A.- S-ro Henri Deillac en Monbahus, Francio, skribas: "Bonvolu daŭrigi se eble tiujn elsendojn. Ili estas mia ĉefa ligilo kun esperanto".

Cl.- S-ro Guillaume Dekrom en Bruxelles, Belgio, skribis entuziasme, ĉar li havis la okazon nin aŭskulti, kaj li konsilis al aliaj bruselanoj nin aŭskulti.

A.- S-ro J. Dérédec en Vannes, Francio, faris lingvan demandon, kiun ni citas: "Unu el la plej gravaj principoj de la lingvo internacia estas ja, ke oni ĉiam transkribu unu sonon per unu sola litero, kaj inverse. Nu mi konstatas, ke plej ofte, ankaŭ ĉe la svisaj elsendoj, oni ne plu diras "speci-a-la, mani-ero, vu-alo," ktp, sed: "specjala, manjero, vŭalo." ĉu oni, tiukaze, ne devus, fakte, skribi tiamaniere, ĉiujfoje, kiam la unua vokalo: i aŭ u, ne portas la akcenton, konservante paralele la eblon uzi la ĝisnunan skribmanieron (kun la ĝusta prononco)?"

Cl.- Kion respondi? Unue, ke ni pardonpetas pro niaj misprononcoj. Due, ke en ĉiu lingvo la ortografia stabileco estas faktoro al unueco, eĉ se iom varias la individuaj kaj lokaj prononcmanieroj. Same estu en esperanto. Ni evitu fonetike transkribi prononcajn variaĵojn, escepte se temas pri stila efeto: ekzemple en teatraĵo aŭ romano kun la celo marki lingvo-nivelon. En la interesa verko Martin Fierro la uzo de la litero J anstataŭ I permesis paroligi ĝaŭsojn en neordinara esperanto: famiĵo, manjero, tju, ktp. Tio restu escepta stilo, eĉ se multaj esperantistoj ne ĉion centprocente ĝuste prononcas. Ni streĉu al norma uzo de la lingvo. Sed ni konsciu, ke neniam la homa parolo absolute respegulos la teorion normon. Sufiĉas atente aŭskulti iun, por ekzemple konstati, ke ne ĉiuj g estas same prononcataj. Same estas por j, kiu estas pli malpli longa.

A.- S-ro R. Despujols en Limoges, Francio sendis aŭskultraporton.

Cl.- Ni dankas en Thiers, Fancio s-ron Marius Dessapt kaj lian tutan familion pro iliaj leteroj kaj pro la akompanaj dokumentoj pri la vivo esperantista en la Centro de Francio. Vi sciuj, ke la gazet-eltranĉaĵoj, kiujn ni ricevas pri la loka esperanto-vivo, post atenta lego ni sendas al la arkivejo "Centre de Documentation et d'Etude sur la Langue Internationale" (Centro de dokumentado kaj de studo pri la internacia lingvo, [CDELI](#)), kiu estas fako de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. S-ro Marius Dessapt klare indikis sur ĉiu eltranĉaĵo la nomon de la gazeto kaj la aperdaton. Bedaŭrinde tro ofte niaj informantoj forgesas tiun ĉi minimuman bibliografian sciigon, kio absolute senvalorigas ilian sendaĵon. Pri forgesoj ni ankaŭ menciuj, ke skribantoj regule forgesas indiki sian adreson kaj reskribas, por informiĝi kial ni ne respondis al ilia informpeto sed denove sen adreso. Kiel agi favore al ili, se ni ne povas ilin atingi?

A.- S-ro Bert de Wit en Vogelenzang, Nederlando, sendas tre interesan leteron pri poresperantaj standoj ekspoziciaj, kiuj migras en Nederlando, kaj pri la ekologia aktiveco de esperantistoj. Ni citas erojn de tiu ĉi letero:

Cl.- "En la pasinta tempo pretiĝis dua stando por informaj celoj, kiun posedas FLE (tio estas Federacio de Esperanto-Organizaĵoj en Nederlando). La unua, kiu pretiĝis en 1974, estos uzata precipe en la orienta parto de Nederlando, la dua, pli nova stando, estos uzata en la okcidenta parto. La stando havas ok panelojn, kiuj montras iun temon rilate al Esperanto, ekzemple literaturo, radioprogramoj, gazetoj, politiko, kongresoj, ktp. La stando estis tuj uzata en la ekspozicio Propramane en Ahoy-halo en Roterdam, kie la roterdama Esperanto-komitato havis standon de la 11-a ĝis la 19-a de novembro 1978. Dum la granda informfoiro en Hilversum, organizita de la Nederlanda Biblioteka Centro, la Instrua Servo de FLE havis ankaŭ budon meze de diversaj ne-komercaj eldonejoj kaj organizoj. Tio okazis la 6-an kaj 7-an de oktobro 1978.

A.- Kaj nun pri la ekologia aktiveco de esperantistoj.

Cl.- "La dana organizo kontraŭ la utiligado de atomenergio, 00A, estas la respondeca organizo malantaŭ la konata emblemo kun la ridanta suno, kun la surskribo: Atomenergio? - Ne dankon! Ĉar tiu organizo havas la patenton pri tiu emblemo, Esperanto-versio ne povis esti farata senkonsento. Tial mi, tio estas Bert de Wit, petis al la danaj amikoj, ĉu eblus ke ili produktu ankaŭ Esperanto-version. Nu, tio eblis kaj momente la ridanta suno kun surskribo "Atomenergio? Ne Dankon!" estas havebla. Ekzistas grandaj biciklaj (eventuale aŭtomobilaj) gluŝildoj, kun diametro de 12,5 centimetroj. Ankaŭ haveblaj estas malgrandaj glumarkoj por leteroj. La profito de la vendo estos utiligata por ekologia aktiveco de Esperantistoj.

A.- Restas en nia leterujo ankoraŭ multaj respondotaj korespondaĵoj. Post kelkaj semajnoj ni refoge babilos kun niaj geaŭdantoj por reciproki la ricevitaĵajn afablaĵojn. La venontan semajnon ni komencos prelegserion pri la porinfana literaturo kaj la infanlibroj. Vi povos konstati la gravecon de la rolo de Svislando en tiu ĉi fako.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!